# LA SUNO HISPANA



Núm. 111 Aûgusto 1926

## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

**Centra Oficejo: 12, Boulevard du Theâtre, Genève (Svislando)**

*Universala Esperanto-Asocio* celas:

Disvastigi la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto.

Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo.

Krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio.

Kreskigi inter siaj membroj fortikan ligilon de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon por fremdaj popoloj.

La Asocio estas neŭtrala rilate al religio, nacieco aŭ politiko.

*Universala Esperanto-Asocio* konsistas:

El sepmil membroj diverslandaj.

El 1.200 Delegitoj kaj Vicdelegitoj en la ĉefaj lokoj, kiuj respondas la informpetojn de la membroj kaj helpas ilin okaze de vojaĝo.

El Komitato, elektita de la Delegitoj, el Centra Oficejo, el teritoria organizo, ktp.

*Universala Esperanto-Asocio* laboras:

Por konstrui centron de esperantista agado bone ordigita kaj forta. Konsiderante, ke internacia organizo estas necesa al lingvo internacia la lasta kongreso oficialigis U. E. A. kiel la tutmondan organizaĵon de individuaj esperantistoj.

## ASOCIACIÓN UNIVERSAL ESPERANTISTA

**Oficina Central: 12, Boulevard du Théâtre, Ginebra (Suiza)**

*La Asociación Universal Esperantista tiene por* objeto:

Difundir el uso de la lengua internacional auxiliar Esperanto.

Fomentar toda clase de relaciones morales y materiales entre los hombres sin distinción de raza, nacionalidad, religión o lengua.

Crear servicios internacionales para uso de todos los hombres, cuyos intereses intelectuales o materiales traspasan los límites de su nacionalidad o el territorio de su idioma.

Acrecentar entre sus miembros un fuerte lazo de solidaridad y desarrollar entre ellos el conocimiento de los pueblos extranjeros.

La Asociación es neutral en asuntos de religión, nacionalidad o política.

*La Asociación Universal Esperantista* consiste:

En siete mil miembros de diversos países.

En 1.200 Delegados y Vicedelegados en las principales localidades, quienes contestan a los informes que les piden los miembros y les ayudan con ocasión de sus viajes.

En un Comité, elegido por los Delegados, en una Oficina Central, en una organización territorial, etc.

*La Asociación Universal Esperantista* trabaja:

Por construir un centro de acción esperantista bien organizado y fuerte. En consideración a que una organización internacional es necesaria a una lengua internacional, el último congreso concedió oficialidad a la U. E. A. considerándola como la organización mundial de los esperantistas individuales.

3.ª Epoko * N.º 111 Aŭgusto * 1926

# LA SUNO HISPANA

Organo de la hispanaj esperantistoj * Organo de los esperantistas españoles

Fondinto: AUGUSTO JIMENEZ LOIRA

Redakcio: Mar, 23 = VALENCIA

La Redakcio korektos la manuskriptojn laŭbezone, kaj la nepresitajn ĝi ne resendos

Direktoro: M. CAPLLIURE

ENHAVO: VI Congreso Nacional de Esperanto en Madrid: Discurso de apertura.—Propono de S-ro. Giménez Verger.—Vizitoj kaj ekskursoj.—Concurso de frases españolas con palabras anfibológicas y su traducción al Esperanto.—Pri Landnomoj la sistemo de D-ro. Zamenhof.—Esperanto ĉe la Unio por la Ligo de Nacioj.—Maniero fortigi la penspovon.—Bibliografio.

## VI Congreso Nacional de Esperanto en Madrid

### DISCURSO DE APERTURA

Al dirigiros la palabra, tropiezo como primera dificultad, con la de no saber cómo llamaros. Si os llamo señores, me parece frío y ceremonioso el apelativo que no responde al afecto efusivo de mi alma agradecida: si os llamo *samideanoj*, incurro en una pretensión excesiva, dado que, a pesar del alto sitio a que me habéis elevado bondadosamente, sé muy bien que no puedo igualarme con vosotros en competencia, ni siquiera en espíritu, para la realización del noble pensamiento que aquí nos reune; si os llamo hermanos, quizá acertara mejor, pues espíritu de fraternidad es el que inspira a una empresa que tiene por principal objeto el emplear un mismo instrumento en la realización de un ideal humanitario y utilitario a un tiempo mismo. Os llamaré, pues, amigos míos, y creo que en este vocativo va bien expresada, al propio tiempo que la fusión de mi espíritu con el vuestro, el convencimiento modesto de cuál es mi verdadera situación respecto a vosotros.

Amigos míos: en un reciente escrito que ha visto la luz en varios periódicos esperantistas de Europa, he dicho con toda sinceridad por qué y cómo *(kial kaj kiel)* yo me hice esperantista. No he de insistir en ello. Básteme decir que desde el momento en que iluminó mi alma la luz surgida del alto espíritu de Zamenhof, yo me siento fortalecido por una nueva energía, que me hace deplorar la corta vida que me resta para emplearla en la realización del pensamiento de mayor utilidad y de más alta inspiración que se concibió en el siglo XIX, en ese siglo de reformas espirituales, de luchas internacionales cruentas y de revoluciones intestinas que la Providencia señaló como preparación, por duras enseñanzas para eras próximas de bienandanzas de amor humanitario y de paz entre los hombres.

La Ciencia, el Arte, la Industria, han venido trabajando sin cesar en medio dela

dolorosa gestación que ha precedido al siglo xx; la espantosa guerra mundial ha sido el toque único de atención con que la trompeta de un juicio inesperado llama a los pueblos a la concentración pacífica. Ellos mismos deben ser sus jueces, ellos deben comenzar por hacer el recuento de todas las conquistas que esa Ciencia, ese Arte y esa Industria les suministran, y ellos deben pensar con verdadera contrición que es llegada la hora de aplicar tales dones providenciales, como esos descubrimientos representan, no en maneras de destrucción, ni en expresiones de odio entre razas, pueblos y familias, sino en palancas y elementos de ligadura, de identificación estrecha, para marchar al unísono por tranquilos caminos bajo un cielo de paz a la obtención del ideal de los ideales, de la fraternidad humana: pues para ser hermanos creó la Providencia a los hombres; todo lo que del cumplimiento de este propósito les aleje por su equivocada conducta, queremos considerarlo como falta nefanda, que merece los reproches de la Historia y que merecerá mañana la maldición de nuestros hijos y sucesores.

Amor, Justicia, Paz, Trabajo y Fraternidad: esas son las palabras que me parecen surgir cada una de uno de los vértices de nuestra estrella *verde*, simbólica de la esperanza y, ved amigos míos, a qué verdad inconcusa llego al formular estas cinco facetas de nuestra empresa y de su símbolo. Cada una de ellas es imposible que sea realizada sin un idéntico instrumento de inteligencia entre los factores que la han de integrar: ni cabe amor, ni puede existir fraternidad sin entenderse; ni puede ser durable la paz entre los que hablan diversas lenguas, como lo demostró el *bíblico* castigo que a la soberbia humana le fué impuesto en Babel; para la eficacia del trabajo en su concepto de Universal colaboración para responder a las necesidades del hombre, es necesario que el hombre se comunique en la misma lengua los progresos de su industria, y que en la misma lengua los trasmita por el comercio; y en cuanto a la justicia, no podrá ser nunca eficaz, si el juzgado no comprende la sanción en una misma lengua, y si el juzgador o el que pretende serlo no entra por un mismo camino en el corazón de todos los hombres.

Amor, Fraternidad, Paz, Trabajo, Justicia: estos deben ser los lemas de nuestra bandera. Instrumentos para su realización, la lengua Universal: no la lengua universal atrofiadora, ni menos destructora de las lenguas nacionales y parciales que colaboran en cada agrupación humana para estímulo de la actividad y gloria del arte, sino la lengua Universal auxiliar que en cada momento de su vida pueda poner a cada raza, a cada nación y a cada hombre en la situación satisfactoria del convencimiento de ser entendido por todos los hombres: las altas inteligencias deben saber que llegan a sus oídos sus sublimes elucubraciones, y los modestos individuos deben también saber que todo lo que en el mundo se piensa, se sabe, se aclara, se escribe y se formula, es por cada hombre conocido y puede en su provecho ser utilizado.

El triunfo de esta idea de Zamenhof, que comenzó por el reducido propósito de una facilidad de comunicación entre diferentes agrupaciones de hombres, si se presenta hoy, como seguro, por lo mismo que viene desprovisto de toda tendencia estrecha, de toda intolerancia, de todo espíritu partidario político, ni de ningún orden. Uno de los medios que ayudarán a la consecución del triunfo, serán estas reuniones en que todos podemos a un tiempo mismo convencernos de lo que ya hemos conseguido y ponernos de acuerdo en lo que hemos de conseguir.

No os importen los obstáculos con que podáis luchar: la pereza la venceréis demostrando la utilidad de vuestro trabajo: la indiferencia, haciendo sentir la altura de vuestros propósitos, y en cuanto al escepticismo misoneísta y neófobo, no os fijéis en él, y recordad que si la sonrisa irónica del crítico es un adorno, la risa del cretino entra en la clasificación de aquellos ladridos de que habla el proverbio árabe al acon-

sejar al que se propone llegar al fin de un camino, que no atienda a los perros que desde las orillas de tal camino le ladran.

Adelante, pues: la era de la navegación submarina, del vuelo aéreo, del teléfono, del fonógrafo, de la telecomunicación y del automovilismo, exige una lengua de comunicación Universal y la obtención de tal propósito es menos fantástica e inverosímil que la conquista de todos esos increíbles progresos con que se envanece justamente la humanidad de nuestros días.

Adelante, y ¡viva el Esperanto!

CARLOS M.ª CORTEZO, *Presidente de H. E. A.*

## PROPONO DE S-RO. GIMENEZ VERGER

Gesinjoroj:

Estas por mi nemeritita honoro paroli antaŭ vi pri afero kiu—laŭ mi opinias—neniam estis pritraktata de hispanaj esperantistoj eĉ de fremdaj.

Dum multe da tempo mi demandis min, ĉu mi devas konigi al vi, oficiale, mian ideon pri enkonduko de Esperanto en novan fakon; sed ankoraŭ hodiaŭ mem mi dubus fari tion, se mi ne opinius tute konvinkite ke akcepti mian planon havigus al H. E. A. la plej altan honoron atingitan de ia esperanta organizaĵo. Estas, do, mia devo, ne resti plu silenta.

Mi dezirus atingi ke vi, distingindaj pioniroj de nia movado, atentu pri la fakto, ke kvankam Esperanto estas la oficiala lingvo de gravaj servoj internaciaj, ekzemple, aviado, radio, ktp., ankoraŭ ne oficialiĝis en la internacia mara komerco, kiu, fakte estas la plej grava servo internacia.

Tiu opinio devigas min esprimi al vi, nedetale, projektskizon naskitan de la legado de artikoleto sur la madrida ĵurnalo *El Sol.*

Oni raportas per ĝi, ke en Mallorca oni aranĝis, velŝipe, marvojaĝon ĉirkaŭ tiu insulo, por ke naturamantoj ĝuu tiel fortajn impresojn kiel sentigas la rigardado de tiuj imponaj belegaĵoj kiuj zonas tiun mirindan landon. Dum la navigaciado—diras *El Sol*—unu *samideano* suprengrimpis la antaŭan maston de la ŝipo, metante ĉe ĝi la esperantistan flagon, kiun la mara venteto flirtigis, kaj tuj estis entuziasme aplaŭdata de la pasaĝeroj starantaj sur la ferdeko.

Tiu fakto igis min mediti pri la nekalkulebla graveco kiun atingus Esperanto se ni enkondukus ĝin en tiel utilan kaj praktikan servon, kiel estas la mara komerco internacia, plenumante tiel la rekomendon de la Parizaj konferencoj pri enkonduko de Esperanto en la komerco.

Feliĉe ni vidas ke la propaganda periodo de Esperanto eniras en praktikecon. Ni povas konstati tiun fakton, se ni atentas ke ekzistas diversaj esperantaj entreprenoj komercaj, kiuj funkcias bonege. Kial, do, ni ne fondas ankaŭ komercan esperantan entreprenon?

Vi scias ke multaj hispanaj 100-tunaj velŝipoj, ordinare vojaĝadas al meksikaj kaj kubaj havenoj, malgraŭ ke tiaj vojaĝoj estas tiel longaj, ke tiaj malgrandaj ŝipoj bezonas duonon da jaro por fari la kompletan vojagon (iro, reveno, ktp.). Kontraŭe, la facilaj vojaĝoj internaciaj tra la mediteranea maro estas tiel maloftaj, ke oni povas certigi ke nur kelkaj francaj havenoj estas vizitataj de niaj velŝipoj, de tempo al tempo.

Verŝajne la havenoj de Italujo, Yugoslavio, Grekujo, ktp., estus komerce vizitataj de la hispanaj ŝipoj, se en tiuj landoj oni parolus kiel en Meksiko, hispane. Sed ne okazas tiel; kontraŭe, en la marbordaj urboj jugoslavaj eĉ ne estas hispanaj agentoj

konsulaj. Tamen pere de nia esperanta lingvo, ni tre facile povus starigi marajn komercajn interrilatojn kun tiu lando.

Nia agado por atingi tiun celon estus nun tre ĝustatempa, ĉar baldaŭ ekzistos komerca traktato inter Hispanujo kaj Yugoslavio. Estas do nedubeble ke se ni farus uzon el tiu okazo, ni nepre sukcesus, utiligante por interŝanĝo de komercaĵoj, la neŭtralan vojon... la maron.

Sed kvankam ne ekzistus tiu favora cirkonstanco, ni ne devus forlasi la projektojn enkonduki Esperanton en la mondan ŝiparon.

La projekto havas du aspektojn: unu, *komerca; esperanta* la alia.

La *komerca*, kiu altirus al ni la praktikularon, nepre sukcesos, kiel ordinare sukcesas la ŝipaj entreprenoj. Por certigi tion, vidu nur ke kvankam la komerca ŝiparo nun ne estas prospera, la posedantoj de ŝipoj faras bonajn negocojn.

La *esperanta* flanko ankaŭ sukcesos, eĉ pli bone, ol la komerca, ĉar la lingva baro, reale malaperas por la esperantistaj maristoj, kiuj nepre trovas en ĉiuj ĉefaj havenoj de la Terglobo, ne sole samlingvanojn, sed bonegajn amikojn, kiuj, tiuokaze, helpus efike por sukcesigi ilin komerce. Sekve, la esperanta propagando estus tiel tre grava.

Do, se nia duobla sukceso (komerca kaj esperanta) estas evidenta, ni ne rajtas prokrasti la starigon de la entrepreno.

La plej interesa afero por realigi tiun deziron, ne estas varbi maristojn por Esperanto; sed aĉeti, ekzemple, bonan 100-200 tunan motorgoeleton, kaj devigi la ŝipestron lerni Esperanton. Dum la unuaj vojaĝoj, okazus ke la ŝipestro ne scipovus nian esperantan lingvon; sed por eviti fiaskon, dum tiu tempo devus esti ĉe la ŝipo, bona esperantisto, kiel estro de komercaj aferoj. Kompreneble, post kelkaj vojaĝoj la ŝipanoj estus niaj plej efikaj propagandistoj.

Sendube estas multaj hispanaj esperantistoj, kiuj unuope povus preni sur sin tiun entreprenon; sed oni ne devas fari tion, ĉar, tiuokaze, la malriĉaj esperantistoj ne atingus monan profiton. Estas dezirinde, ke oni fondu maran kompanion per malgrandaj akcioj (100 pesetoj ekzemple), kaj tiel la malriĉuloj—mi unu el ili—ankaŭ povus esti akciuloj.

La direktanta komitato de la kompanio, nepre devus konsisti el fervoraj samideanoj; sed al la ceteraj akciuloj povus aparteni neesperantistoj, sed nur triono el la tuta anaro.

La oficiala loĝejo societa devus sidi en Madrido, sed en la gravaj urboj apudmaraj ni devus havi delegitojn.

Por ke vi konvinkiĝu pri la bona funkciado de la projekto, rimarku ke ekzistas akciaj kompanioj esperantistaj kiuj nur vendas esperantaĵojn, kaj malgraŭ ke tiaj komercaĵoj nur interesas la esperantistojn, la kompanioj vivas. Sekve, nia entrepreno, kiu estus tute ordinara el la komerca vidpunkto, sukcesus eĉ pli bone.

Kiel vi scias, ĉiu unuopa ŝipo aŭ kompanio de ŝipoj, rajtas adopti privatan flagon, por ĝin uzi krom la nacia. Kompreneble, nia ŝipo aŭ niaj ŝipoj, povus adopti kaj uzi plenrajte la verdan flagon de Esperanto.

Nia entrepreno devus esti alligita al U. E. A., ĉar U. E. A., per siaj delegitoj, estus nia sukcesilo.

Kiam la Universala Kongreso de Esperanto okazus en apudmara urbo, nia ŝipo devus fari vojaĝon al ties haveno, por ke la reprezentanto de H. E. A. en la Kongreso, havu sian oficialan loĝejon sur la ŝipo, kiu devus havi konfortan kajuton kun apuda skriboĉambro, tiucele.

Fine: Pro tio ke la plej grava fako por Esperanto estas la mara komerco internacia; pro tio ke per ĝi ni havigus al la hispana komerco novajn merkatojn; pro tio ke

la dirita entrepreno liverus al ni monan profiton; pro tio ke la esperanta lingvo rapidege disvastiĝus, ĉar la alilandanoj imitus tuj nian agadon, kaj pro tio ke nia H. E. A. atingus la unuan lokon en la historio de Esperanto:

Mi petas ke vi konsideru tiun projekton kiel meritas ĝia graveco, kaj, aceptante, principe, la fondon de ŝipa kompanio por komerci internacie per Esperanto, ke oni difinu komitaton en marborda urbo, por fari tie la necesajn antaŭlaborojn kaj informi al la Moŝta Prezidanto de H. E. A. pri la ebleco organizi tiun fakon, por plenumi tiel efike la rekomendon de la Parizaj konferencoj pri enkonduko de Esperanto en la komerco.

Mi esperas ke, se decas, vi agos tiel, kiel mi proponas, por la bono de Esperanto kaj honoro de Hispana Esperanto-Asocio.

NOTO: La Kongreso ekakceptis tiun proponon, sed por studi ĝin pli delate kaj informi pri ĝi al H. E. A. elektis komisionon kies anoj voĉdonataj de la Kongresanaro estis S-roj. Saralegi, Piñó kaj la proponinto S-ro. Giménez Verger.

## VIZITOJ KAJ EKSKURSOJ

Multe kontentigis la kongresanojn ĉiuj oficialaj kunvenoj organizitaj de la Loka Komitato de la Kongreso, pro la soleneco, harmonio kaj bonordo regantaj en tiuj aktoj. Sed tio, kio sendube supersatigis la kontentecon de la plimulto el ili, altirante ilian scivolemon en la unua momento kaj lasante poste en iliaj animoj agrablegan neforgeseblan impreson, estis la dumkongresaj vizitoj en Madrido kaj la ekskursoj al proksimaj gloraj urboj.

Certe tia turisma parto de la programo devas nepre eniri en la efektivigon de ĉiu Kongreso, ĉar tiamaniere oni altiras al ĝi multajn kongresanojn, eĉ ne tute esperantemajn, sur kiujn la plej efika propagando falas. La organizontoj de venontaj Kongresoj devas ne forgesi tiun konvenan aspekton de l' afero.

Kaj, ĉar estas neeble raporti detale pri tiuj okazintaĵoj en la malgranda disponebla gazetspaco, ni nur diros resumajn vortojn.

La Madridaj vizitoj estis gvidataj de Majoro Mangada, kun tiel bona lerteco, aktiveco kaj akurateco, ke li meritas specialan premion donotan de ia Ordeno pri la *Senhalta movado*, ĉar sole dum

## VISITAS Y EXCURSIONES

Muy contentos quedaron los Congresistas de todas las reuniones oficiales organizadas por el Comité Local del Congreso, por la solemnidad, armonía y buen orden que reinaron en aquellos actos. Pero lo que, sin duda alguna, ha colmado la alegría de la mayoría de ellos, atrayendo su curiosidad al principio y dejando luego en sus almas una impresión inolvidable y agradabilísima, es el haber tomado parte en las visitas dentro de Madrid y en las excursiones a las cercanas ciudades célebres.

Ciertamente esta parte de turismo del programa debe entrar precisamente en la realización de todo Congreso, pues de este modo se atrae gran número de congresistas, hasta sin ser entusiastas del todo por el Esperanto, sobre quienes actúa la propaganda más eficaz. Los que hayan de organizar los futuros Congresos no deben olvidar este aspecto conveniente de la cuestión.

Y como es imposible relatar detalladamente aquellos sucesos en el pequeño espacio del periódico, de que podemos disponer, sólo diremos algo en resumen.

Las visitas en Madrid fueron dirigidas por el Comandante Mangada, con tan buen acierto, actividad y exactitud, que merece un premio especial a otorgar por alguna Orden del *Movimiento continuo*,

kelkaj posttagmezaj promenadoj li ebligis la vizitojn al muzeoj, parkoj, palacoj, ministrejoj kaj grandega nombro de aliaj vidindaĵoj plej famkonataj. Sed ĉio, kompreneble, dank' al nia krura fortikeco kaj memvola disciplino... Ankoraŭ ja ŝajnas al mi aŭdi la alttonan voĉon de sinjoro Mangada, kiu, post la laboraj matenaj kunsidoj, kiuj en kelkaj tagoj daŭris ĝis la dua posttagmeze, alvokadis la pilgrimantojn kaj ordonadis al ili: «Je la tria, *akurátege*, ĉe la ĉefa pordo de la Hispana Banko». Kaj ni estis devigataj tuj forkuri, tagmanĝi dum kelkaj minutoj kaj ree tramveturi al la difinita loko. Sed tio estis ĝuo!

Tiamaniere ni pasigis dimanĉon 30ªⁿ de majo kaj la sinsekvajn tri tagojn, lasante por la ekskursoj al Aranjuez (Aranhuec'), Toledo kaj El Escorial (Eskorial') tri plenajn tagojn: ĵaŭdon, vendredon kaj sabaton.

Tiaj ekskursoj, organizitaj kaj gvidataj

pues tan sólo en unos cuantos paseos por las tardes hizo posible las visitas a museos, parques, palacios, ministerios y grandísimo número de otras notabilidades dignas de verse. Pero todo, naturalmente, gracias a la fuerza de nuestras piernas y nuestra voluntaria disciplina... Por cierto que aún me parece estar oyendo la voz aguda del Sr. Mangada, quien, tras las sesiones de trabajo por la mañana, que algunos días duraban hasta las dos de la tarde, llamaba a los peregrinos y les daba órdenes: «A las tres, *en punto*, en la puerta principal del Banco de España». Y no teníamos más remedio que salir corriendo, comer en unos cuantos minutos y volver a tomar el tranvía para el sitio designado. ¡Pero esto daba gusto!


Así pasamos el domingo 30 de mayo y los tres días siguientes, dejando para las excursiones a Aranjuez, Toledo y El Escorial tres días completos: jueves, viernes y sábado.

Tales excursiones, organizadas y di-



Grupo de congresistas saliendo del Museo de Arte Moderno de Madrid.

de S-ro. Rodríguez Escartín, meritas la plej grandajn laŭdojn. La elektitaj urboj, la bona aranĝo de la vagonaraj vojaĝoj, la profitado de la tempo por vizitoj, la lerte kombinitaj kaj servitaj festenoj, ĉio, ĉio estis tre saĝe aranĝita kaj realigita por



Presidentes de los seis congresos nacionales esperantistas reunidos en el de Madrid: de izquierda a derecha, D. R. S. Rocamora, de Barcelona; D. M. Maynar, de Zaragoza; D A. Piñó, de Valencia; don E. Lunate, representante del de Bilbao; D. F. Azorín, presidente del de Córdoba; y D. J. Mangada, representante del de Madrid.

la plej malkara prezo. Pro tio tiu sinjoro multfoje estis devigata aŭdi dum tiuj tri tagoj niajn propramovajn unuanimajn kriojn: «Vivu S-ro. Escartín!»

La sola bedaŭro estis, ke la tempo mankis kaj la vizitojn oni faris rapidege. Tial ni konservas nur pri ĉio kvazaŭ filmvidan rememoron kaj estas eble apartigi en nia cerbo la multenombrajn impresojn ricevitajn, dank' al ilia malsameco, pro la tute aparta artsento, kiu kaptis nin, vidante la belaĵojn enhavatajn en ĉiu el la tri diritaj monumentaj urboj, sentoj kies resumon oni povas fari jene.

rigidas por el Sr. Rodríguez Escartín, merecen las mayores alabanzas. Las ciudades elegidas, la buena disposición de los viajes en tren, el aprovechamiento del tiempo para visitas, los bien combinados y servidos banquetes, todo, todo fué dispuesto y realizado con acierto y por un precio muy módico. Por eso dicho señor tuvo que oir muchas veces durante aquellos tres días nuestras naturales y unánimes aclamaciones: «¡Viva el Sr. Escartín!»

Lo único lamentable fué que el tiempo escaseaba y las visitas se hicieron con gran prisa. A causa de esto, sólo conservamos de todo un recuerdo como de vistas cinematográficas y nos es posible separar en nuestro cerebro las numerosas impresiones recibidas, gracias a su desemejanza, por la diferente sensación artística causada en nosotros, viendo las bellezas contenidas en cada una de las citadas ciudades monumentales, sensaciones cuyo resumen puede hacerse como sigue.

En Aranjuez, antaŭ ĝiaj vastegaj ĝardenoj, kiuj enhavas reĝajn palacojn, plenajn je multvaloraj artaĵoj; ĝiaj senkompare belaj arbaroj, formantaj la bordojn de l' majeste trankvila rivero Tajo (Taĥo), tra kiu oni ŝipveturas per vaporboatoj; ĝiaj fontanoj kaj ĝiaj riĉenhavaj fruktolegomejoj—, ĉio superkovrita de la plej brilkolora bluĉielo kaj lumigita de la plej hela suno—, oni sentas fortege la plaĉan trankvilecon de la Naturo en ĝia plej pura aspekto kaj ŝajnas ke ni estas transportitaj en paradizon...

En Toledo, kiun oni vidas de la unua momento alten sur la supro de granita rokaro, ĉirkaŭita preskaŭ tute de nia konatulo rivero Tajo, tie ĉi bruetanta kaj furiozeta, kuŝanta en la profundeco de giganta kavaĵo farita de ĝi mem inter la ŝionegoj de l' montaro; kie ĉio estas impona pro sia antikveco kaj merito, komencante de la ŝtona pontego sur kiu oni alpaŝas, la murgardita vojo supreniranta al la urbo, kontraŭ la Sankta Servanda kastelego staranta en la alia riverflanko; la urbo mem, kun siaj mallarĝaj kaj krutaj stratoj, siaj majestaj katedralo, preĝejoj, reĝa palaco — nuntempe Infanteria Akademio—, multege da belaj konstruaĵoj arabaj kaj gotikaj, antikvegaj monumentoj enhavantaj la plej strangajn artaĵojn kaj kuriozaĵojn—, ĉio ŝajnas kvazaŭ ŝtonigita historia libro, kiu impresas nin per speciala sento pri antikveco kaj transportas nian spiriton al pratempaj civilizacioj...

Kaj en El Escorial, kuŝanta pli ol mil metroj super la marnivelo, apud la deklivo de l' montaro Guadarrama, antaŭ kiu staras la reĝida palaceto kaj ĝardeno kaj la eksterordinare grandioza konstruaĵo nomata Monasterio (Monaĥejo) de Sankta Lorenco—, starigita laŭ ordono kaj direktado de l' granda reĝo Filipo IIa—, ni ricevas tiel novan neniamsentitan impreson en nia animo, ke ĝi estas tute neeldirebla, kaj nur ni povos iom komprenigi tian impreson al tiuj, kiuj ĝin ne vi-

En Aranjuez, ante sus inmensos jardines, que encierran palacios reales, llenos de valiosos objetos artísticos; sus arboledas de sin par belleza, que forman las orillas del majestuoso y tranquilo río Tajo, por el que se navega con canoas de vapor; sus fuentes y sus ricas huertas y frutales—, todo cobijado por un cielo del más puro azul e iluminado por el más brillante sol, — se siente con fuerza la plácida tranquilidad de la Naturaleza en su aspecto más sencillo y parece como que estamos transportados a un paraíso...

En Toledo, que se ve desde el primer momento arriba en lo alto de un montículo formado de rocas de granito, circundado casi todo por nuestro conocido río Tajo, aquí un tanto ruidoso y agitado, deslizándose en lo profundo de un gigantesco foso cavado por él mismo entre los peñascos de la montaña; donde todo es imponente por su antigüedad y mérito, empezando por el gran puente de piedra sobre el cual se pasa, el camino amurallado que sube hacia la ciudad, frente al enorme castillo de San Servando, situado al otro lado del río; la población misma, con sus estrechas y empinadas calles, sus majestuosos catedral, iglesias, palacio real —actualmente Academia de Infantería—, multitud de hermosas construcciones árabes y góticas, antiquísimos monumentos que encierran los más raros objetos artísticos y curiosidades—, todo aparece como un libro histórico petrificado, que nos impresiona con una sensación especial de antigüedad, trasladando nuestro espíritu hacia pretéritas civilizaciones...

Y en El Escorial, situado a más de mil metros sobre el nivel del mar, junto a la falda de la cordillera del Guadarrama, ante la que se ven el palacete y jardín del príncipe y el monumento de extraordinaria grandiosidad llamado Monasterio de San Lorenzo—, erigido por orden y bajo la dirección del gran rey Felipe II—, experimenta nuestra alma una impresión tan nueva y nunca sentida, que no hay palabras para expresarla, y sólo podremos hacer comprender de al-

dis, dirante ke oni sentas sin kvazaŭ neniiginta, aŭ ke ni kredas esti malgrandiĝintaj korpe kaj spirite ĝis atoma malgrandeco, kiam de ni estas rigardataj kun fervora admiro la imponega eksteraĵo de tiu Templo-palaco, karakterizita de la plej severa kaj proporcia linisimpleco; ĝiaj altegaj navoj; ĝiaj kolosaj kolonegoj kaj muroj; ĝiaj graciaj kupoloj, strangaj platplafonoj kaj marmoraj plankoj; ĝiaj admirindaj maŭzoleoj por reĝoj kaj princoj; ĝiaj murpentraĵoj kaj muzeoj; ĝia ĥorejo, ĝia grandvalora biblioteko, riĉa je antikvaj manuskriptoj precipe arabaj, ktp., ktp.

Oni aldonu al tiuj ĝuoj kunvivadon kun preskaŭ cent afablaj gesamideanoj plej bonhumoraj, inter kiu estis belegaj sinjorinoj kaj fraŭlinoj kaj nedubeble ĉiuj envios nin, kiuj havis la sorton partopreni en tiuj ekskursoj, kaj ili pretigos sin por la venonta Kongreso.

Foso.

gún modo tal impresión a quienes no lo han visto, diciendo que nos sentimos como anonadados, o que creemos haber empequeñecido en cuerpo y alma hasta un tamaño atómico, cuando contemplamos con fervorosa admiración el sorprendente aspecto exterior de aquel Templo-palacio, caracterizado por la más severa y proporcionada sencillez de líneas; sus altísimas naves; sus colosales columnas y muros; sus elegantes cúpulas; raras bóvedas planas y pisos de mármol; sus admirables mausoleos para reyes y príncipes; sus pinturas murales y museos; su coro, su valiosísima biblioteca, rica en antiguos manuscritos, principalmente árabes, etcétera, etc.

Añádase a estos placeres la convivencia con cerca de cien amables *samideanos*, poseídos del más grato buen humor, entre los que había bellísimas señoras y señoritas, y seguramente todos nos envidiarán, a quienes tuvimos la suerte de tomar parte en aquellas excursiones, y se prepararán para el próximo Congreso.

Foso.

---

## CONCURSO DE FRASES ESPAÑOLAS CON PALABRAS ANFIBOLÓGICAS Y SU TRADUCCIÓN AL ESPERANTO

Anunciado el concurso en el número de esta Revista correspondiente al mes de marzo último, señalando como premio para el mejor trabajo que se presentara la cantidad de cincuenta pesetas recibidas de varios esperantistas de Pamplona, Bilbao, Coruña y Madrid, los *samideanos* de Valencia remitieron con el mismo objeto veinticinco pesetas, y, por tanto, según indicaba el anuncio publicado en LA SUNO HISPANA correspondiente al mes de abril siguiente, el premio sería de setenta y cinco pesetas, o más si se recaudaran.

Terminado el plazo del concurso resultaron presentados cuatro trabajos con los siguientes lemas: 1.º «En la mondon venis nova sento». 2.º «Cuando el Levante se levante». 3.º «Mi tre preĝas kaj laboras, sed sorto min ne favoras y 4.º «Esperanto lingvo internacia».

Reunido el Jurado, compuesto por los distinguidos y competentísimos esperantistas, Académicos de la lengua auxiliar internacional Esperanto, Sres. D. Vicente Inglada, Teniente Coronel del Cuerpo de Estado Mayor, D. Mariano Mojado, Sacerdote, y D. José Perogordo, Teniente Coronel del Real Cuerpo de Artillería, y examinados los trabajos mencionados, acordó no adjudicar el premio a ninguno de los

cuatro concursantes por no acreditar éstos los suficientes méritos; pero teniendo al mismo tiempo en cuenta que los concursantes habían demostrado su buen deseo, su laboriosidad y su entusiasmo por nuestro ideal, acordó también distribuir entre los cuatro concursantes por partes iguales la cantidad recaudada.

Conocido el fallo del Jurado, contra el que no cabe recurso alguno, y habiéndose recibido, antes de dictarse aquél y después de publicada la adición al premio del Concurso, la cantidad de veinticinco pesetas, de las cuales doce pesetas cincuenta céntimos fueron entregadas por D. Manuel Maynar Barnolas, Presidente de la Federación esperantista aragonesa y representante en el VI Congreso Español de Esperanto, recientemente celebrado en Madrid, de las Corporaciones oficiales, Sociedades y esperantistas de aquella región adheridos al Congreso; y las otras doce pesetas cincuenta céntimos fueron también entregadas, con el mismo objeto, por D. Benigno de Luna Gómez, Secretario del Concurso, sin voz ni voto, resulta que la cantidad a repartir entre los cuatro concursantes es la de cien pesetas, y por consecuencia que cada uno de estos cuatro debe percibir veinticinco pesetas.

Los autores de los indicados trabajos pueden presentarse a recibir cada uno las veinticinco pesetas que les corresponden, en el domicilio social del Grupo Esperantista de Madrid, calle de Sagasta, número 10, 1.°, los martes de siete a ocho de la tarde, después de publicado el presente aviso.

Como por su mucha extensión sería difícil publicar en LA SUNO HISPANA íntegros los cuatro trabajos presentados, una vez que se haya obtenido autorización de todos los concursantes, se insertarán en esta Revista los grupos de frases españolas de más feliz redacción en Español y de más acertada traducción al Esperanto, tomándolos proporcionalmente de los cuatro trabajos presentados.

---

## ESPERANTISTA AKADEMIO

**Prez. Prof. Th. Cart**
(12, Rue Soufflot, Paris)

Nova eldono-Represado dezirata

# PRI LANDNOMOJ

## LA SISTEMO DE D-RO. ZAMENHOF

En la ĉi suba esploro mi tute *objektive* klarigos la zamenhofan sistemon.

Ĝin mi ne intencas, ne *volas* diskuti, sed mi rajtas konstati, ke ĝi zorge atentas pri la necesa rilato inter la nomo de la lando kaj tiu de la regnano, ke tre sufiĉe *logika* ĝi estas kaj ke, kiel skribis, en sia Raporto (paĝ. 8, konkludo), Prof. Grosjean-Maupin «la fideleco al la ĝenerale akceptita tradicio estas, el praktika vidpunkto, pli sendanĝera ol ia ajn provo», sed plie, ke ĉia alia sistemo okazigas fatale inter la Esperantistoj kontraŭstaron, proteston kaj diskutojn nepre evitindajn.

## MALNOVA MONDO

### EŬROPO, AZIO KUN EGIPTUJO (1)

La gento donas sian nomon al sia lando per aldono del' sufikso *-ujo* (2).

(1) Por la antikvaj Grekoj kaj Hebreoj *Egiptujo* estis kvazaŭ Azia «kromlando. Ĝi, — sed ne la cetero de Afriko, apenaŭ konita, — apartenas al la *Malnova Mondo*. — Same por D-ro. Zamenhof, la tradukinto de la Biblio.

(2) Anstataŭ *-ujo* oni ĉiam rajtas uzi *-lando: Franclando* (mallongige kaj skribe: *Francl.)* apud *Francujo*, kiel *pomarbo* apud *pomujo*, *preĝdomo* apud *preĝejo*. — *Lando* ludas tie la rolon de sufikso.

| Gento: | Adjektivo: | Lando | Gento: | Adjektivo: | Lando | Gento: | Adjektivo: | Lando |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Angl-o | -a | -ujo | Grek-o | -a | -ujo | Pol-o | -a | -ujo |
| Bavar-o | » | » | Hind-o | » | » | Portugal o | » | » |
| Belg-o | » | » | Hispan-o | » | » | Prus-o | » | » |
| Brit-o | » | » | Holand-o (2) | » | » | Ruman-o | » | » |
| Bulgar-o | » | » | Hungar-o | » | » | Rus-o | » | » |
| Dan-o | » | » | Ĥin-o | » | » | Saks-o | » | » |
| Egipt-o | » | » | Ital-o | » | » | Skot-o (1) | » | » |
| Fin(n)-o (1) | » | » | Japan-o | » | » | Sved-o | » | » |
| Franc-o | » | » | Norveg-o | » | » | Svis-o | » | » |
| German-o | » | » | Pers-o | » | » | Turk-o | » | » |
| | | | | | | k. t. p. | | |

La sama regulo taŭgas kompreneble por la postmilite restarigitaj sendependaj landoj:

| Gento: | Adjektivo: | Lando | Gento: | Adjektivo: | Lando | Gento: | Adjektivo: | Lando |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Aŭstr-o | -a | -ujo* | Latv-o | -a | -ujo | Slovak-o | -a | -ujo |
| Ĉeĥ-o | » | » | Litov-o | » | » | Ĉeĥoslovak-o | » | » |
| Eston-o | » | » | Slav-o | » | » | k. t. p. | » | » |

# NOVA MONDO

## AFRIKO (3), AMERIKO KAJ OCEANIO

Ĉar, politike, malaperis la primitivaj gentoj, la lando mem donas sian nomon al la regnano per aldono de l' sufikso *-ano*.

| Lando: | Adjektivo: | Regnano | Lando: | Adjektivo: | Regnano | Lando: | Adjektivo: | Regnano |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Alĝeri-o | -a | -ano | Kanad-o | -a | -ano | Peru-o | -a | -ano |
| Argentin-o | » | » | Kapland-o | » | » | Tunizi-o | » | » |
| Aŭstrali-o | » | » | Kolombi-o | » | » | Urugvaj o | » | » |
| Bolivi-o | » | » | Marok-o | » | » | Uson-o | » | » |
| Brazil(i)-o (4) | » | » | Meksiki-o(5) | » | » | Venezuel-o | » | » |
| Ĉil(i)-o | » | » | Nov-Zeland-o | » | » | k. t. p. | | |

(1) Anstataŭ *Fin(n)ujo*, *Skotujo* oni ĝenerale uzas, konforme al la nacia nomo, la formojn: *Fin(n)lando*, *Skolando* (Vidu Rim. 2).

(2) En *Holando*, *gentnomo*, *lando* estas ne sufikso sed parto de l' radiko; parto de l' radiko ĝi estas ankaŭ en la *landnomoj: Nederlando*, *Islando* kaj, se *Ira* gento vere ne ekzistas, en *Irlando*; sekve ilia adjektiva formo estas *Nederlanda*, *Islanda*, k. t. p. kaj la regnana nomo: *Nederlandano*, k. t. p.

*Io* ne estas sufikso por landnomoj; pri tio *ĉiuj* konsentas, kaj sekve, se *i* apartenas al la radiko, la adjektiva formo finiĝas per *i-a* kaj la nomo de l' regnano per: *i-an-o* (Vidu ekzemplojn en la listo *Nova Mondo* kaj Rim. 6).

(*) Fakte, nova ŝtato de la Aŭstroj.

(3) Esceptinte *Egiptujon* (Vid. Rim. 1).

(4) Ambaŭ formoj: *Brazil-o* kaj *Brazili-o* estas pli malpli internaciaj kaj uzitaj. Oni do rajtas elekti inter ili. Persone mi preferus — ĉar pli simplaj — la formojn *Brazilo* (adjektivo; *brazila*; sed, de *Brazilio*, la adjektivo estas necese brazilia). Pri Ĉil(*i*)o oni rajtas same argumenti.— Ĉar tiaj detaloj neniel kontraŭas al la Zamenhofa Fundamenta principo, plej bone decidos la enlandanoj mem en interkonsento kun la Akademio.

(5) Formo konsilata de D-ro. Zamenhof por diferencigi la landon kaj la ĉefurbon.

## NOMOJ DE PROVINCOJ KAJ URBOJ:

Aldoni la finaĵon *-o* al la provinca nomo: *Brandenburgo, Silezio, Provenco,* — se ne eble, senŝanĝe: *Loiret, Essex.*

Kelkaj nomoj de gravaj ĉefurboj esperantiĝis: *Parizo, Ĝenevo, Kopenhago.*—Aliaj simple alprenas la finaĵon — o: *Londono, Berlino,* — se ne eble, senŝanĝe: *Versailles, Breslau.*

En tiu-ĉi landnoma demando, kiel en aliaj, plej bona gvidanto restas por ni D-ro. Zamenhof.

TH. CART,
Prez. de la Lingva Komitato
kaj de ĝia Akademio.

---

# Esperanto ĉe la Unio por la Ligo de Nacioj

La jena Rezolucio pri Esperanto estas farita de la *League of Nations' Union* en Londono.

### Rezolucio pri internacia helpa lingvo

La Unio por la Ligo de Nacioj, konsciante, ke reciproka komprenebleco estas esenca por internacia kompreno kaj konkordo, bonvenigas la aprobon de la Brita Asocio (por la Progresigo de la Scienco) pri la enkonduko de internacia helplingvo kiel surogata komunikilo inter personoj, kiuj ne lernis la lingvon unu de la aliaj. Ĝi notas la konkludojn de la Brita Asocio, ke la Latina estus tro malfacila por tiu celo, kaj ke la alpreno de lingvo moderna donus nekonvenajn superaĵojn kaj ekscitus ĵaluzon. Ĝi subtenas la elekton de Esperanto, kiun faris la Brita Asocio, pro

*a)* ĝia neŭtraleco
*b)* ĝia simpleco
*c)* la bone elpensita principaro, sur kiu ĝi baziĝis
*d)* la rapideco, laŭ kiu ĝi estas lernebla

# El Esperanto en la Unión para la Liga de Naciones

Esta resolución sobre Esperanto está tomada por la *League of Nations' Union,* en Londres.

### Resolución acerca de una lengua auxiliar internacional

La Unión para la Liga de Naciones, convencida de que la posibilidad de entenderse recíprocamente es esencial para la comprensión y concordia internacionales, da la bienvenida a la aprobación de la Asociación británica para el progreso de las ciencias acerca de la introducción de una lengua auxiliar internacional como medio substituto de comunicación entre personas que no han aprendido idiomas ajenos. Hace notar las conclusiones de la Asociación británica de que el latín sería demasiado difícil para ese fin y que la adopción de una lengua moderna daría una superioridad no conveniente y excitaría la envidia.

Apoya la elección del Esperanto, que hizo la Asociación británica, por

*a)* su neutralidad;
*b)* su sencillez;
*c)* los bien meditados principios sobre que se basa;
*d)* la rapidez con que se puede aprender;

*e)* la amplekso de ĝia jama uzado.

La Unio por la Ligo de Nacioj bonvenigus deklaron de la Ligo de Nacioj, instigantan la Registarojn de Membro-Ŝtatoj, ke ili kuraĝigu la instruadon de Esperanto en la lernejoj.

*e)* la amplitud con que es ya usado.

La Unión para la Liga de Naciones vería con mucho agrado una declaración de la Liga de Naciones instigando a los Gobiernos de los Estados Miembros, para que ellos protejan la enseñanza del Esperanto en las escuelas.

# Maniero fortigi la penspovon

Ni nun povas aranĝi direkti nian studon pri la penspovo, al la afero de la praktiko, ĉar la studo ne kondukanta al la praktiko, estas senfrukta. La antikva deklaro ĉiam estas vera: *La celo de la filozofio estas fini la doloron.* Ni devas lerni disvolvi, kaj poste uzi nian penspovon, por helpi niajn ĉirkaŭestantojn: la vivantojn, kaj la nomatajn *mortintoj;* por akceli la homevoluon, tiel kiel ankaŭ nian propran progreson. La penspovo povas pliiĝi nur per la firma kaj persista praktiko. Tiel laŭlitere kaj vere kiel la muskola disvolvo dependas de la ekzercado, de la muskoloj, tiel ankaŭ la mensa disvolvo dependas de la mensa ekzerco. Estas leĝo de la vivo, ke la disvolvo rezultas el la ekzerco. La vivo, nia *Mi*, ĉiam estas serĉanta pligrandan eksteresprimon per la ĝin havanta formo. Laŭ ĝi estas vokata eksteren per la ekzerco, ĝia premo sur la formon devigas ĉitiun plilarĝiĝi, kaj nova materio estas alportata al la formo, kaj, ĉitiumaniere, parto de la ekspansio daŭriĝas. Kiam la muskolo plilonĝiĝas de la etzerco, plia vivo alfluas al ĝi, la ĉeloj multiplikiĝas, kaj la muskolo disvolviĝas ĉitiumaniere. Kiam la menskorpo vibras sub la pensado, aldoniĝas al ĝi nova materio de la mensatmosfero, kiu asimiliĝas, pliiĝante tiel la grando kaj la komplekso de la strukturo de la menskorpo. Ĉitiu, konstante ekzercata, kreskas, ĉu estas bonaj, aŭ malbonaj la pensoj per kiuj ĝi ekzerciĝas. La penskvanto

# Modo de fortalecer el poder del pensamiento

Podemos proceder ahora a dirigir nuestro estudio del poder del pensamiento a la cuestión de la práctica, pues el estudio que no conduce a la práctica, es estéril. La antigua declaración siempre es verdadera: *El fin de la filosofía es poner término al dolor.* Tenemos que aprender a desarrollar, y después a usar, nuestro poder de pensamiento, para ayudar a los que nos rodean: los vivos y los llamados *muertos;* para apresurar la evolución humana, así como también nuestro propio progreso. El poder del pensamiento sólo puede aumentarse por la práctica firme y persistente. Tan literal y verdaderamente como el desarrollo muscular depende del ejercicio de los músculos, así el desarrollo mental depende del ejercicio de la mente. Es una ley de la vida, que el desarrollo resulte del ejercicio. La vida, nuestro *Yo*, está siempre buscando una mayor expresión externa, por medio de la forma qne la contiene. A medida que es llamada afuera por medio del ejercicio, su presión sobre la forma hace que ésta se ensanche, y nueva materia es aportada a la forma, y de este modo una parte de la expansión se hace permanente. Cuando el músculo se alarga por el ejercicio, más vida afluye a él, las células se multiplican y el músculo se desarrolla de este modo. Cuando el cuerpo mental vibra bajo la acción del pensamiento, se le añade nueva materia de la atmósfera mental, la cual se asimila, aumentando

kaŭzas la disvolson de la menskorpo; la prensklaro kaŭzas la klazon de materio estiĝanta en ĉitiu disvolvo. Nu: la grizmateriaj ĉeloj de la fizika cerbo, multiplikigas laŭ la cerbo sin ekzercas pensante. Postmortaj ekzamenoj pruvis ke la pensula cerbo, ne nur estas pligranda kaj plipeza ol la cerbo de la kruda kamparano; sed ankaŭ ĝi havas multe pligrandan nombron da cirkonvolucioj. Ĉitiuj donas grandan plion da supraĵo al la grizmaterio, kiu estas la tuja fizikinstrumento de la penso. Ĉitiumaniere la menskorpo kaj la fizika cerbo disvolviĝas de la ekzerco, kaj tiuj kiuj volas pli bonigi ilin, kaj pligrandigi ilin, devas sinturni al la regula ĉiutaga penso, en la pripensita celo plibonigi siajn menskapablojn. Estas nenecese aldoni ke la povoj neprestantaj en la konanto, disvolviĝas ankaŭ pli rapide de ĉitiu ekzerco, kaj funkcias sur la fortilojn kreskantaforte.

Por ke ĉitiu praktiko povu plenefiki, ĝi devas esti metoda. Ke homo elektu valoran libron, pri iu afero loga al ĝi, libron verkitan de kompetentulo, kiu enhavas novajn kaj energiajn pensojn. Oni devas atente legi unu aŭ kelkajn sentencojn, kaj poste la leganto devas pensi, intense kaj fikse, pri tio legita. Estas bona regulo pensi dufoje, dumlege (1), ĉar' la celo legi, ne estas, simple, akiri novajn ideojn, sed fortikigi la pensfakultojn. Se eble, oni devas difini duonhoron por ĉitiu praktiko; sed la estudanto devas komenci per kvaronhoron, ĉar komence li trovus iom laciga la fikson de la atento.

(1) La frazo «pensi dufoje dumlege» ne montras klare la kvanton da pensado. Mi duonmemoras esti legintа aliverke pliklaran formulon, nome: «pensi duoblan tempon ol tiun uzitan por la lego de la meditata afero» (N. de la T.).

así en tamaño y en complejidad de estructura. Un cuerpo mental, constantemente ejercitado, crece, ya sean buenos o malos los pensamientos en que se ejercite. La cantidad de pensamiento determina el desarrollo del cuerpo mental; la clase de pensamiento determina la clase de materia que se emplea en este desarrollo. Ahora bien: las células de la materia gris del cerebro físico, se multiplican a medida que el cerebro se ejercita pensando. Exámenes *post mortem* han demostrado que el cerebro del pensador, no sólo es más grande y más pesado que el cerebro del patán, sino que también tiene un número mucho mayor de circunvoluciones. Estas proporcionan un gran aumento de superficie a la materia gris, la cual es el instrumento inmediato, físico, del pensamiento. De este modo el cuerpo mental y el cerebro físico se desarrollan por medio del ejercicio, y los que quieran mejorarlos y agrandarlos, tienen que recurrir al pensar regular, diario, con el propósito deliberado de mejorar sus capacidades mentales. Es innecesario añadir que los poderes inherentes al conocedor, se desarrollan también más rápidamente con este ejercicio, y funcionan sobre los vehículos con fuerza creciente.

A fin de que pueda surtir todo su efecto, esta práctica debe ser metódica. Que un hombre escoja un libro valioso, sobre algún asunto que le sea atractivo; un libro escrito por un autor competente, que contenga pensamientos nuevos y vigorosos. Deben leerse lentamente una sentencia o unas pocas, y luego el lector debe pensar con intensidad y fijeza sobre lo que ha leído. Es una buena regla el pensar dos veces mientras se lee (1), pues el objeto de leer no es simplemente adquirir nuevas ideas, sino el fortalecer las facultades pensantes. Si es posible, debe dedicarse media hora a esta práctica; pero

(1) La frase «pensar dos veces mientras se lee», no muestra claramente la cantidad de pensamiento. Yo tengo idea de haber leído en otra obra, una fórmula más clara, a saber: «pensar doble tiempo del invertido en la lectura del asunto meditado» (N. del T.).

Ciu persono, komencanta ĉitiun praktikon, kaj ĝin regule daŭriganta kelkajn monatojn, konscios, post tiu tempo, tre klaran disvolvon de la mensforto, kaj vidos ke li povas trakti la ordinarajn problemojn de la vivo, en maniero multe pli efika ol antaŭe. La Naturo estas mastrino tre justa ĉe siaj pagoj, kaj donas al ĉiu, ekzakte la salajron kiun ĝi gajnis; sed eĉ ne unu centimon kiun ĝi ne meritis. Ĉiuj kiuj volas havi pliigita la salajron de la fakulto, devas gajni ĝin pensante multe.

(El hispanlingva traduko de l' anglolingva verko de Annie Besant, «La Penspovo: Ĝ a Rego kaj Kulturo», tradukis),

LUIS SANTAMARINA.

Barcelono.

el estudiante debe principiar por un cuarto de hora, porque en un principio encontraría algo fatigosa la fijeza de la atención.

Toda persona que principie esta práctica y la continúe con regularidad durante algunos meses, al fin de este tiempo estará consciente de un desarrollo bien claro de la fuerza mental, y verá que puede tratar los problemas ordinarios de la vida, de un modo mucho más efectivo que antes. La Naturaleza es una dueña muy justa en sus pagos, y da a cada cual exactamente el salario que ha ganado; pero ni un céntimo que no haya merecido. Los que quieran tener el salario de la facultad aumentado, tienen que ganarlo pensando mucho.

(De la traducción al español, de la obra en inglés, de Annie Besant «El Poder del Pensamiento, su Dominio y Cultura»).

LUIS SANTAMARINA.

Barcelona.

# Bibliografio

*Universala Kongreso de Esperanto kaj Internacia Somera Universitato.— Kongresa Libro — 1926 — Edinburgo —* 31 julio-7 aŭgusto.

La Loka Komitato de la Kongreso eldonis tre belan 88-paĝan broŝuron kun granda nombro de ilustraĵoj kaj multvalora teksto. Ĝi estas bonega gvidilo tra Edinburgo por la kongresanoj kaj juvela memoraĵo pri nia nunjara kunvenego por ĉiuj samideanoj, ĉu ĉeestintaj ĉu ne la Kongreso.

Jen ĝia resuma enhavo: *La Espero*, muziko kaj paroloj de nia himno.—Patronoj kaj Loka Kongresa Komitato.— La Kongresejo.—Kongresa Regularo.— Internacia Somera Universitato.—Detala programo de la kongresagoj, kun blanka loko por ĉiutagaj notoj.—La Organizo

# Bibliografía

*Congreso Universal de Esperanto y Universidad Internacional de verano.— Libro del Congreso — 1926 — Edimburgo —* 31 julio 7 agosto.

El Comité local del Congreso ha editado un elegante folleto de 88 páginas con gran número de ilustraciones y excelente texto. Es una utilísima guía de Edimburgo para los congresistas y un precioso recuerdo de nuestra asamblea del año actual para todos los correligionarios, ya asistieran o no al Congreso.

He aquí un resumen de su contenido: *La Espero*, música y letra de nuestro himno.—Protectores y Comité local del Congreso.—Local del Congreso.—Reglamento de los Congresos.—Universidad Internacional de verano.—Programa detallado de los actos del Congreso, con

de la Esperanto-Movado.—Kontrakto de Helsinki.—Interna regularo de la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj.—Lingva Komitato kaj Academio.—La Brita Esperantista Asocio.—Gvidilo al Edinburgo, en dek promenoj.—Urbaj tramvojoj kaj motor-omnibusoj.—Historia tabelo pri Edinburgaj konstruaĵoj.—La tuttaga ekskurso.—Brita mono.—Poŝto.—Plano de Edinburgo kaj multenombraj komercaj anoncoj.

Niaj anglaj samideanoj tute bone scias agi sur propaganda kampo kaj ili meritas nian varman gratulon pro la eldonado de tiel bela libro.

espacio en blanco para notas diarias.—La organización del movimiento esperantista.—Convenio de Helsingfors.—Reglamento interior de la Representación Permanente de las Sociedades Nacionales.—Comité lingüístico y Academia.—La Asociación británica esperantista.—Guía de Edimburgo, en diez paseos.—Tranvías y ómnibus de motor de la ciudad.—Tabla histórica de los edificios de Edimburgo.—La excursión en un día.—Moneda inglesa.—Correo.—Plano de Edimburgo y numerosos anuncios comerciales.

Nuestros correligionarios ingleses saben obrar muy bien en el campo de la propaganda y merecen nuestra entusiasta felicitación por la publicación de tan hermoso libro.

---

Ni ricevis de S-ro. Jules Perlet, Prezidanto de la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (Poŝtkesto transito 560, Bern, Svislando) du laudkartetojn kun serio da belegaj kartoj pri la alpveturado en Svislando, kiel kompletigon al la turista karto eldonita de la Publika Servo de la Svisa Fervojo Federacia, disdonita dum la pasinta jaro. La teksto de tiuj kartoj estas germana, franca, angla, itala kaj esperanta, kaj prezentas bonan propagandilon.

Samtempe ni ricevis artan anoncon pri la Internacia ekspozicio por rivera navigado kaj uzo de hidraŭlika forto en Basel, de la 1ª julio ĝis 15ª septembro 1926.

Ĉiujn diritajn propagandilojn oni povas ricevi senpage petante ilin de la dirita sinjoro, kiun ni dankas pro lia sendaĵo.

Recibimos del Sr. Julio Perlet, Presidente de la Asociación Suiza de Ferroviarios esperantistas (Apartado de Correos 560, Berna, Suiza), dos pequeños mapas con una serie de hermosas tarjetas que tratan del alpinismo en Suiza, como complemento del mapa del turista, editado por el Servicio público del Ferrocarril Federativo de Suiza, repartido el año pasado. El texto de estas tarjetas está en alemán, francés, inglés, italiano y esperanto, y constituyen un buen medio de propaganda.

Al mismo tiempo hemos recibido un artístico anuncio de la Exposición Internacional de navegación fluvial y empleo de fuerza hidráulica en Basel, desde el 1.º de julio al 15 de septiembre 1926.

Dichos documentos de propaganda pueden recibirse gratuitamente, pidiéndolos al mencionado señor, a quien damos las gracias por su envío.

TIPOGRAFIA MODERNA, A C. DE M. GIMENO, PRIMADO REIG (antes Avellanas), 9, VALENCIA

Por faciligi al siaj membroj la praktikan uzon de la lingvo kaj favorigi esperantan korespondadon, turismon, komercajn rilatojn, interŝanĝon de poŝtmarkoj, ktp.

Por konatigi la valoron de nia lingvo ĉe interŝtataj oficejoj, grandaj internaciaj societoj, ktp. La sukceso de tiuj klopodoj multe dependas de la nombro de la personoj en kies nomo la Asocio rajtas paroli.

*Universala Esperanto-Asocio* donas:

Al la Membroj: Membrokarton kaj ducentkvindekpaĝan jarlibron kun la adresoj de la Delegitoj, esperantistaj grupoj, gazetoj, organizaĵoj, kun sciigoj pri internaciaj rilatoj, ktp. Ĉiu membro deziranta korespondi aŭ interŝanĝi rajtas presigi dufoje sian adreson en la gazeto *Esperanto* aŭ speciala aldono.

Al la Membro-Abonantoj: La gazeton *Esperanto*, internacia ĉeforgano de la esperantistoj, kun artikoloj literaturaj, sciencaj, teknikaj kaj precizaj informoj pri la movado.

Al la Membro-Subtenantoj: kun la supraj presaĵoj premion konsistantan el valoraj literaturaĵoj laŭ elekto el la jenaj tri sendaĵoj:

1. Verkaro de D-ro. Zamenhof (ok volumoj de tradukoj klasikaj.
2. Internacia Biblioteko Esperanta (32 volumetoj de internacia literaturo; libreto poŝformata).
3. «El Parnaso de popoloj» (poeziaĵoj el tridek lingvoj majstre tradukitaj de Antoni Grabowski).

*Uuiversala Esperanto-Asocio* postulas:

Jaran kotizon de 5 fr. por Membro, de 12'50 fr. por Membro-Abonanto kaj de 25 fr. svisa valoro por Membro-Subtenanto (favorprezo por hispanoj: 6, 15, 30 pesetoj).

Para facilitar a sus miembros el uso práctico del idioma y favorecer la correspondencia esperantista, el turismo, las relaciones comerciales, intercambio de sellos, etc.

Para hacer conocer el valor de nuestra lengua en las oficinas entre estados, grandes asociaciones internacionales, etcétera. El éxito de estas gestiones depende en mucho del número de personas en cuyo nombre tenga derecho a hablar la Asociación.

*La Asociación Universal Esperantista* entrega:

A los Miembros: La Carta de socio y un anuario de 250 páginas, con las direcciones de los Delegados, grupos esperantistas, revistas, organizaciones, con noticias sobre relaciones internacionales, etc. Todo miembro que desee corresponder o establecer intercambio, tiene derecho a que se imprima dos veces su dirección en la revista *Esperanto* o especial suplemento.

A los Miembros-Suscriptores: La revista *Esperanto*, principal órgano internacional de los esperantistas, con artículos literarios, científicos, técnicos y exactos informes sobre el movimiento.

A los Miembros-Protectores: Con los impresos anteriores, un premio consistente en valiosas obras literarias a elección entre las tres remesas siguientes:

1.ª Obras del Dr. Zamenhof (ocho volúmenes de traducciones clásicas).
2.ª Biblioteca Internacional Esperantista (32 pequeños volúmenes de literatura internacional; forma manual de bolsillo).
3.ª «El Parnaso de los Pueblos» (poesías de 30 lenguas, magistralmente traducidas por Antonio Grabowski).

*La Asociación Universal Esperantista* solicita:

Una cuota anual de 5 frs. por Miembro, de 12'50 frs. por Miembro-Suscriptor y de 25 frs. por Miembro-Protector (precio especial para españoles: 6, 15, 30 pesetas, respectivamente).

# Internacia Centra Komitato de la esperanto-movado

**Comité Central Internacional del movimiento esperantista**

12, Boulevard du Théâtre, Genève (Ginebra) Svislando (Suiza)

*Prezidanto:* D-ro. Edmond Privat, 12, Boulevard du Théâtre, Genève.
*Instruado & Statistiko:* Prof. D-ro. Dietterle, Seumestrasse, 10, Leipzig-Schl.
*Financo & Juro:* W. M. Page, 31, Queen Street, Edinburgh.
*Gazetaro* (Prensa): Rudolf Hromada, Socharská, 333, Praha VII.
*Teknikaj Fakoj* (Secciones técnicas): M. Rollet de L' Isle, 35, rue Sommerard, París, V.
*Socia Fako* (Sección social): Julia C. Isbrücker, v. Beverningkstr. 10, s' Gravenhage.

**Konsilantoj**

*Extrem-Oriento:* Won Kenn, Kanton.
*Ameriko:* E. Legrand, Montevideo.

**Administrado**

*Ĝenerala Sekretario:* Rob. Kreuz, Genève.
*Sekretario:* Andreo Ĉe, Genève.

## HISPANA ESPERANTO-ASOCIO

**(Asociación Esperantista Española)**

*Calle de Sagasta, núm. 10, Cruz Roja, Madrid*

*Presidente:* D. José Perogordo, calle de los Santos, 2, Madrid.
*Secretario:* D. Mariano Mojado, Abascal, 13, pral. A. Madrid.
*Tesorero:* D. Juan Carrasco Cuenca, Corredera Alta, 3, 3.°, Madrid (10).

## FEDERACIÓN ESPERANTISTA LEVANTINA

*Calle del Mar, núm. 23, Ateneo, Valencia.*